

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Aperas semaine, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu lun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“ senpage por ET-abonantoj.

La prezo de unu numero estas por la landoj:

Aŭstra 1.00 Kr.	Ceĥosl. 1.20 Kr.	Hungara 50 Kr.	Litova 25 Cd.	Rumana 4 Leol
Belga 0.65 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.80 Lir.	Nederl. 0.15 Hfl.	Rusa 100 Gmk.
Brita 3/4 Pc.	Franca 0.60 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.30 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 4 Levul	Germana 0.60 Mk.	Jugosl. 2 Din.	Polia 400 Mk.	Svisa 0.30 Fk.
Dana 0.80 Kr.	Hispana 0.30 Pes.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.60 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Estonoj kaj latvoj demandu la prezon ĉe sia Abonelo. — Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.60 Fr. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svizan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 150 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komercio“ kaj specialaj numeroj speciala prezo.

FINNLANDA
FOIRO
EN
HELSINKI
ĈIUJARE
1-6. DEJULIO

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Nort, Barce'ona
H. Fischer, grandindustriisto, București (Rum.)
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekkonto Köln 70865, por Teo Jung, Horrem.

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Literatura r.d.: Zanoni.

N-o 123 :: Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 11. II. 23.

10000 — 5000.
Du nombroj — du celoj.

La unua nombro (10000) estas la provizora celo de UEA, la dua nombro (5000) estas la provizora celo de ET.

La jarlibro de UEA por 1922 montras statistikon de Esp. organizaĵoj, laŭ kiu ĉ. 20 000 Esperantistoj estis organizitaj en naciaj asocioj kaj grupoj. Intertempe tiu nombro konsiderinde kreskis preskaŭ en ĉiuj landoj. Kaj kiu nombras la multajn, multajn samideanojn, kiuj tute ne estas organizitaj! Do la celataj nombroj ne estas io neatingebla.

UEA nun havas 6000 membrojn, ET havas 3000 kaj kelkcent abonantojn. Tio estas jam 60% aŭ iom pli de la aspirata nombro. Ĉu ne estas eble atingi ankaŭ la ceterajn 40%? Certe jes. Ni devas nur ĉesigi la pluan sencelan disigadon de niaj fizikaj kaj materiaj fortoj kaj, laŭeble, la jam disigitajn ree kunigi. Ĉiuj seriozaj Esperantistoj devas kolektiĝi ĉirkaŭ sia plej grava internacia organizaĵo UEA kaj ĉirkaŭ sia plej grava internacia ĵurnalo ET.

Aligo al UEA estas eĉ multe pli grava ol aligo al loka grupo aŭ nacia asocio, kvankam ankaŭ tiuj organizaĵoj estas necesaj por la propagando. Sed nia movado estas esence internacia, kaj pro tio nia internacia organizaĵo kaj nia internacia ĵurnalo estas unuavice subtenindaj.

Ĝis nun ni agis alie: unue la loka grupo, ĝin ni opiniis plej subteninda, nepre aliĝinda; unue la provinca ligo; trie la landa asocio; kaj nur laste la internacia organizaĵo, se por ĝi entute io restis! Estonte ni devos renversi tiun vicon: unue la internacia organizaĵo, kaj nur poste ĉio alia!

10000 membrojn aspiras UEA, 5000 abonantojn aspiras ET. Helpe ĉiu serioza ano de la lingvo internacia, baldaŭ efektiviĝi tiujn aspirojn!
T. J.

Fakaj Kongresoj.

Dum niaj grandaj universalaj kongresoj ni sentis la bezonon kunveni fakte. Sed la konfuzo estas tro granda. Niaj universalaj kongresoj estas grandaj festoj; la ĝojo, kiun ni sentas renkontante personojn konatajn aŭ ne, apartenantajn al diversaj nacioj, kiuj parolas la saman lingvon, de ni tiel facile komprenatan, faras, ke ni bezonas

festi, amuzi, babili, sed ne diskuti pri seriozaj aferoj. Plie tro multaj estas la fakoj. Inĝenero povas esti liberpensulo, socialisto, ŝakludanto, sportamanto, vegetarano, pacifisto, teozofisto ktp. kaj ne povas samtempe ĉesiti ĉiujn fakajn kunvenojn.

Do tiuj fakaj kunvenoj povas esti nur la komenco de pli seriozaj aplikadoj de Esperanto. Kaj tamen, ĉar ni nun estas plenkreskuloj, necesas, ke ni komencu pli serioze apliki kaj ke ni montru al skeptikuloj, kiamaniere nia lingvo estas aplik-ebla al praktika celo.

Sajnas al mi, ke venis la tempo por la pli praktikaj Esperantistoj agi pli serioze. Dum la junaj Esperantistoj kaj la nove varbitaj ĉeestas la grandan jaran feston de Esperanto, ni devas kunveni en alia urbo de alia nacio por praktike apliki la lingvon internacian.

Ekzemple ni povas komenci tiamaniere, ke estos eble al fakuloj, kiuj deziras sin amuzi en la universala kongreso, partopreni ĝin post la faka kunveno. Tial ni povas havi kunvenon de Internacia Scienca Asocio en München aŭ Frankfurt tri tagojn antaŭ la Universala Kongreso de Nürnberg. La membroj de ISA prizorgos la organizadon de la kunveno. Ĉiuj sciencaj, teknikaj, medicinaj, pedagogiaj aŭ similaj asocioj germanaj de la urbo elektita estos energie interesataj al la afero por la bona akcepto de la samfakuloj, ejo por la kunveno, vizito al sciencaj laborejoj aŭ fabrikoj ktp.

Ni havos tiamaniere tre seriozan kunvenon, kiu atentigos precepte la samfakulojn germanajn, kaj la Esperantistoj de la urbo povos helpi kiel interpretistoj ktp. Fine ni pridiskutus pli serioze la organizadon de nia Internacia Scienca Asocio kaj komencus organizi fakajn kunvenojn de ĝi: medicina, pedagogia, teknika ktp.

Progresante nia Internacia Scienca Asocio dispartigos en aplikaj asocioj, sed nun estos bone, ke ni komencu per scienca kunveno, sed ne en la urbo de la universala kongreso. Ĉar poste, ni estas konvinkitaj, la Esperantistoj estos tre multnombraj, oni ne plu bezonos kunveni fakte dum la tempo de la universala kongreso, ni lasos, ke la junaj Esperantistoj aŭ la rentuloj ĉeestu la feston kaj ni laborantaj en la plej diversaj fakoj kunvenos laŭ la oportuneco dum diversaj tempoj en diversaj urboj. Ĉu ni povas komenci jam dum tiu ĉi jaro?

D-ro Alfredo Stromboli,
Torino, Italujo.

Siberiaj rememoroj.

Pri la Rusuja movado Esperanta dum la milita kaj postmilita tempo oni scias tre malmulte. Esceptoj tiurilate estas lastatempe la du ĉefurboj Petrograd'o kaj Moskva'o. Pli malmulte ankoraŭ ol pri Rusujo oni scias pri Siberio, nome nenion.

Dum preskaŭ tuta milita tempo kaj poste ĝis la 20. jaro mi vivis kiel militkaptito en Tomsk'o, ĉefurbo kaj sola universitatourbo de Siberio. Ĝian Esperantan movadon dum tiu tempo mi provos skizi.

En ĉiuj militantaj regnoj la milito nian movadon estingis. Diversspecaj estas la kaŭzoj. La milita spirito, nutrita per la gazetaro, malfavoris nian movadon. Krom tio la plej agemaj Esperantistoj estis devigitaj forlasi sian civilan okupon por militiri. La ondoj de l' milito ankaŭ la Tomsk'ajn samideanojn disportis tra la tuta Siberio kaj Rusujo. La bone organizita grupo ekdormis kaj dormis profunde ĝis la dua alveno de bolŝevikoj („bolŝe“ signifas ruse „pli“, „menŝe“ = malpli; bolŝevikoj = pliuloj t.e. ekstremaj socialistoj, menŝevikoj = malpliuloj = malplikstremaj socialistoj.)

La unuan fojon mi aŭdis pri Esperanto en militkaptiteco aŭtune de la 19. jaro, kiam mia kamarado W. Matzke al mi ŝerce proponis lerni Esperanton por mallongigi la longajn, Siberiajn vesperojn. „Por lerni alian lingvon, ni estas tro malenerĝaj kaj malpersistaj“ — la militkaptiteco eŝikas malbone la animstaton de la homo — li argumentis; ŝerce ni komencis, serioze ni daŭrigis. Mi estis entuziasmita! Ni ambaŭ estis komencantoj, sed li estis bonega kaj lertega lingvolernanto kaj de post la unu leciono — ni lernis laŭ la ruse eldonita „Fundamento“ — li alprenis la rolon de instruisto, kaj mi estis la lernanto. Lin favoris la pli bona kono de latina lingvo. Mi lernis tage kaj nokte; antaŭ la ekdormo mi ankoraŭ foje ripetis mian lecionon kaj matene antaŭ la teo denove. Kvankam mi tiamaniere scilis fine la tutan „Fundamenton“ parkere, tamen li restis mia majstro. Dum nia „kurso“ mi jam komencis legi artikolojn el „La ondo de Esperanto“ kaj „Scienca Revuo“. Kompreneble mi tuj ekpropagandis entuziasme Esperanton inter la kamaradoj. Multajn samsortianojn mi sukcesis varbi aŭ per vortoj aŭ per la fakto, ke mi post kelktaga lernado scipovis kun malpli granda peno legi Esperantajn artikolojn ol aliaj la rusan lingvon lernintaj post la sama nombro da monatoj. La fino de tiu propagando estis kurso —

kiel ĉiam en Esperantujo. Pensante „per instruado ni lernas“ kuraĝe mi komencis. Mi tute ne dubas, ke ĉe tiu mia unua kurso, kiun sekvis dum kvaronjaro du aliaj, la instruisto lernis pli multe ol la lernantoj.

Nur nun mi sciĝis, ke en la militkaptiteco, kie loĝis mil oficiroj, troviĝas kelkaj malnovaj hungaraj kaj unu germana Esperantisto. La plej lerta inter ili estis s-o Kelemen, kies Esperanto min ravis. Li estis kvazaŭ nia reĝo kaj al li estis ĉiu nove bakita Esperantisto prezentita, same kiel la junaj nobelinoj ĉe l' kortego al la reĝino. Kun Esperantistoj li parolis nur Esperante kaj nur post unu jaro mi sciĝis, ke li — li estis hungaro — parolas ankaŭ germane. La tempo de la kursoj Esperantaj venis. Ĉiuloke, ĉiugangle oni aŭdis aŭ por aŭ kontraŭ Esperanto. „La tendaro frenezigiĝis“, diris la mokemuloj. „La tendaro malsanas je „plenitis“, ĉar inter la germanan kaj hungaran lingvon nun miksiĝis je la ĉiutaga vespera promenado io nova: Esperanto. (Plenitis = rusa vorto „plen“ signifas militkaptiteco, kaj „plenitis“ malsana estis tiu, kiu la militkaptiteco konfuzis.) Je la fino de la „Esperanto-frezezo“ ni kalkulis 170 „frezeziĝintojn“ — kvinonon de la tendarenloĝantoj! Eĉ Esperantan gazeton ni eldonis. „La semanto“ estis kompreneble mane skribita kaj estis de ĉiu numero nur malmultaj ekzempleroj, kiuj iris de mano al mano. Unu „frezezo“, s-o Sorger, parolanta multajn lingvojn, eĉ ĥinan, eĉ veis, ke li lernos dum 48 horoj Esperanton tiagrade, ke li kapablos skribi pri iu ajn temo. Kaj li — gajnis!

Dum tiu „frezezo tempo“ Esperanto dormis en la urbo; estis eĉ danĝere okupi sin pri „Internaciaj aferoj“, ĉar oni suspekta en tiuj homoj bolŝevikanojn, kontraŭ kiuj la tiam Siberia registaro — Kolcak — militis. Ĉiuj bolŝevikanoj estis senindulge mortpafitaj — ofte pro sola suspekto. Ĉe tiuj cirkonstancoj estas facile kompreneble, ke nur malmultaj homoj konfesis, ke ili estas Esperantistoj. Tamen estis dum tiu tempo fondita la „Tutsiberia Esperanto-Oficejo“ kaj la „Tutsiberia Esperanta Asocio“, ambaŭ en Tomsk'o. Aŭdinte la unuan fojon ĉi tiujn titolojn, mi opiniis trovi fortajn organizaĵojn kun amaro da Esperantistoj anĝintaj kaj mi trovis la solan fondinton s-on Hoves, universitatan studenton. Ĉi tiu sperto estis mia unua sed forta disreŝigo en Esperantujo. Tamen mi sukcesis ricevi de Hoves, cetera tre sperta kaj laborema samideano, adresojn de Esperantistino — ĉarma fraŭlino — kaj Esperantisto, s-o Kluŝnikof, kiu fariĝis mia vera frato

Jaro Sten:

Floretino.

Abio Sopir estis jam studento de universitato en Praha kaj ankoraŭ li ne scias, kio estas amo. — Li sopiris ion nekonatan, belan, li admiris, eĉ adoris multajn knabinojn jam de sia knabaĝo, sed li ne gustumis ankoraŭ la dolĉon de virinaj lipoj. — Li estis solema, el familio oficista, kiu trankvile, modeste vivis en diversaj urboj kamparaj kaj fine en la ĉefurbo de Ĉeĥoslovakujo. — Pro sia solemeo li eĉ ne avidis kamaradojn kaj ĝuste pro tio li restis tiel longe netuŝata. Sed la amo kun kreskanta aĝo tamen konstante frapis la pordeton de lia koro. Li legis foje en ĵurnalo proponon de knabino dekokjara pri korespondado sub la signo: „Sonorleto“. Li skribis al ŝi: „Nekonatulino! Mi kuraĝas skribi al Vi kaj esperas trovi en Vi amikinojn, kun kiu mi povus skribi min amuzi, interŝanĝi opiniojn, kune kun Vi serĉi la bonon, belon kaj veron en la naturo, en nia vivo kaj sekvi la leĝojn de l' progreso. Mi supozas, ke eĉ la vivo de homoj povas esti bela kaj ke Vi per Viaj leteroj plibeligos ĝin! Senpacience mi atendas Vian respondon. Ĉu mi estos tiel feliĉa legi ankaŭ de Vi kelkajn linojn? Abio Sopir, Vinohrady, n-o...“ Kaj la respondo venis! Kia ĝojo kaptis la studenton, ke li premas la unuan fojon en la mano leteron de virino, je kiu li eble enamigos! Kun tremanta koro li malfermis la leteron kaj legis: „Nekonata amiko! Viaj pensoj kaj idealoj ravis min, mi dezirus korespondadi kun Vi plu kaj legadi kun intereso Viajn leterojn. Sed mi timas, ke mi ne kontentigos Vin per miaj respondoj, estante simpla knab-

ino sen troa studado, sed ankaŭ idealplena. Ĉu Vi ĝojos pri tio, ke ni loĝas proksime? Spirite Via Floretino.“

Li legis kaj relegis tiujn kelkajn vortojn sentante sin feliĉega, ke tiu letero apartenas al li, ke ies delikata mano por li skribis tiujn linojn, ke iu knabino devis okupiĝi je li skribante la leteron. Kiel plaĉis al li ŝia modesteco, kiel surprizita li estis, agreble surprizita, ke ŝi loĝas proksime, en la sama kvartalo, ke li eble baldaŭ eĉ vidos ŝin propralkule, eĉ eble parolos kun ŝi! Ĉu estas io tiel alta atingebla? Ĉu li ne larmos pro ĝojo kaj plezuro atingonte tion? Li kisis la leteron, bone kaŝis kiel sekretajon. Tiun tagon estis bela printempa vetero aprila, la urbaj parkoj bele verdiĝadis kaj tial nia feliĉulo vizitis posttagmeze la urban parkon apud la stacidomo de Wilson. Kaj tie, en bela, betula bosko li sidigis, serena, rigardante sopire la freŝajn betulojn, dor'otante per siaj okuloj ilian blankan ŝelon, tiel gajne impresantan. Kaj li eliris la letereton, preskaŭ parkere ellernis ĝian enhavon kaj — komencis kunmeti la respondon. Li esprimis en ĝi sian ĝojon, ke ŝi loĝas proksime, ke ili ambaŭ enspiras preskaŭ la saman aeron kaj ke li estus feliĉa koni la domon, kiu kaŝas la subtilan korespondantinojn. Fininte la malneton li estis revenanta malrapide hejmen, kun kapo kilnita, en revol. De tempo al tempo li rigardis la preterpasantinojn kun la ideo: Ĉu eble tio ne estas mia nekonatulino? Kaj unu el ili ekridetis je lia rigardo. Lia koro pli forte ekbatis: Ĉu ŝi? Li turnis sin — ŝi ankaŭ! Kaj denove ŝi ekridetis! Li ne plu kuraĝis reveni al ŝi kaj pli-rapidigis siajn paŝojn al la helmo. Hejme li alskribis ankoraŭ: „Mi renkontis belan, freŝan knabinojn en ruĝa vesto kun bukiaj nigraj haroj, kiu iel scie ekridetis al mi. Ĉu mi eble jam trovis la estaĵon de miaj songoj?“ Tiu letero dum longa

tempo ne estis respondata. Li skribis denove, ke li ĉiutage atendas la letereton vane, kiel ŝi — delikatulino — povas esti tiel kruela kaj ne respondi? Postmorgaŭ venis ree letero kun riproĉeto: „Ĉu li povas konjekti, ke ŝi agas tiel kokete por ekridi je ĉiu preterpasanto? Tiel ŝi neniam kondutus! Li tro eraras, supozante, ke ŝi estas tiom altrudema!“ Finante ŝi skribis sian aduson, sed ŝi petis insistie ne atendi ŝin antaŭ la domo pro la gepatroj. Kiam li tralegis la leteron, li iom malĝoĝiĝis. Li diris al si naive: Ĉu estas la peko ekrideti al iu? Ĉu amika vizaĝo ne povas rebrili en la vizaĝo de proksimulo? Ĉu ne taŭgas por bela knabino serena mieno? Kial kulpigi je io nedeca virinon, kiu per ekrideto aperigas interon por iu viro? Kaj en tiu senco li ankaŭ respondis petante pardonon kaj permeson konatiĝi kun ŝi persone. Ŝi ne permesis. Ŝi esprimis bedaŭron, ke li volas sekvi la samajn vojojn, kiel ĉiuj viroj: persone interrilati. Interalie ŝi skribis: Ĉu ne povas esti sufiĉe feliĉaj niaj animoj, kiuj sin komprenas, kiuj povas letere interproksimiĝi kaj ĝui aliajn plezurojn de kuneco?“ Li do kontentiĝis por kelka tempo per leteroj, plu senvualigadis sian koron, skribis eĉ entuziasman leteron pri nova sia amataĵo, pri Esperanto, kiun li lernis en publika kurso kaj rekomendis ankaŭ al sia amikino ĝin studadi. Ŝi promesis tion fari, malsekretigis, ke ŝi estas oficistino en libroj kaj permesis fine — laŭ nova instigo de Sopir — ke li venu al ŝia oficejo por akompani ŝin hejmen, venontan merkredon je la kvina horo posttagmeze, kaj ke li atendu ŝin apud la robinio ornamita en homalto per blanka rozo. Venis la tago signifoplena. Junia suno ankoraŭ forte brilis, kiam li alvenis. Des pli agreble estis atendi en la ombro de l' ornamita arbo, kiun li facile trovis. Tio, ĝojo, senpacience, sopiro, ĉio miksiĝis en li. Kun

estimo li rigardis eĉ la arbon, kvazaŭ li trovis eĉ ĝin sankta kaj vive imagis la momenton, kiam ŝi — kun kiu li nun parolos! — alfiksos per pinglo la rozon al la trunko de l' arbo. Li serioze, respektplene deprenis la rozeton per pinglo traigitan, karesis ĝin kaj ekpensis: „Kiu povas esti tiel kruela kaj trapiki la gracian floron?“ Jen eliris du knabinoj el la pordego. Li ekĝemis. Ili iris kune kelkajn paŝojn, poste unu revenis — eble ŝi ion forgesis — la alia alproksimiĝis. Li preskaŭ ĉesis spiri... Sed ŝi — pasis eĉ ne rigardante lin. Do, tio ne estas ŝi! Li elspiris. Plua atendado. Jen, la alia venas: Belkreska, en simpla malhelblua vesto kun nigra borderaĵo, kun pala ĉapo samkolora kaj sub ĝi du okuloj brilaj, brunaj, observantaj la ĉirkaŭaĵon... „Ŝi, ŝi,“ li tremis, per tremanta mano li levis la ĉapelon, salutis mallerte kaj ekbalbutis: „Fraŭlino...“ Ŝiaj okuloj fiksitiĝis je li kaj poste ŝi etendis sian manon al la nova amiko dirante: „Bonan tagon!“ Momento de konfuzo... Kaj poste sekvis ŝia dolĉa, mallaŭta: „Ni iru!“ Kaj ili iris tra la strato „Národní“ kaj la placo „Václavské“ al la muzeo; ŝi rapidetis, kaj li — konstante iom post ŝi paŝante — penis paroli beŝaĵojn, sed li parolis sensencaĵojn kaj naivaĵojn. Ŝi foje respondis, foje ne respondis, sed senĉese ŝi rapidis kvazaŭ ŝi volus jam vidi finita la neagrablan akompanadon... Proksime ĉe ŝia loĝejo ili disiĝis. Li ne estis kontenta pri sia parolmaniero kaj konfuzplena konduto, li riproĉis al si, ke ĝis nun malmulte li rilatis kun knabinoj kaj ke tial li ne scias ĝuste agi kun ili. „Unua impresio ne bona — ĉio for!“ tiel diradis al si la malfeliĉulo kaj ekintencis fariĝi pli perfekta societano por pli plaĉi al la ĉarma brunokulino. De tiu tempo li akompanadis kune kun aliaj studentoj partoprenantinojn en la Esperantokurso kaj penis ellerni la arton lerte interparoli

*) Vinohrady = antaŭurbo de Praha.

Li estis juna lernejestro — mi estas instruisto — kaj se mi estus deziranta, li estus fordonacinta al mi sian tutan tolaĵon. Kvankam mi lin certigis, ke mi bezonas nenion, ĉar mi sufiĉe perlaboris, tamen mi ofte devis akcepti tolaĵon, foje eĉ novan pantalonon kaj varman peltoĉapon. „Se vi ĝin ne akceptos, mi nuligos nian fratecon.“ Li ĉiam minacis.

Se vi hazarde, mia kara frato, legos ĉi tiujn liniojn, akceptu mian koran dankon kaj fratan saluton!

Kvankam la Kolĉaka registaro — Kolĉak estis pli poste de la bolŝevikoj mortpafita — estis al la Esperanta movado ege malfavora, tamen kelkaj samideanoj kunvenadis ĉe s-ino Merinova, bonega Esperantistino. La eliro el la militkaptitejo estis al ni malpermesita. Eĉsepo estis la vizito de la preĝejo. Do ni iris preĝelon akompanataj de 8—10 rusaj soldatoj. La soldatoj restis ekstere kaj ni iris preĝelon; ili ne scitis, ke ni tuj forlasis la preĝelon tra alia pordeto. Sur la strato ni iris aparte kaj dislokiĝis je la dekstra kaj maldekstra strata flanko — kiel konspirantoj, ĉar estis ĉiuj kunvenoj severe malpermesitaj. Antaŭ la fino de la Diservo ni sammaniere revenis. En mia libera tempo — mi nun estis devigita perlabori kiel brosiisto monon, ĉar por la monata salajro da 50 rubloj oni povis aĉeti nur 3—4 kg da pano — ni legis Esperantajn librojn, prunteprenitajn el la urba biblioteko, kiu estis en terura malordo. Ĝi enhavis la tutan antaŭmilitan literaturon, eĉ la unuan germanan eldonon de la „Fundamento“ kun la konata „promeso“. Sed la libroj estis dispruntitaj jam de jaroj kaj poparte dislokiĝis ĉe la Esperantistoj, kies adresojn ofte oni eĉ ne scitis. Samideano Némethy — hungara militkaptito — transportis ĝin en la militkaptitejon kaj prenis sur sin ties ordigon kaj registradon, kiun laboron li kun sia kutima pacienco plenumis. De tiu tempo la biblioteko, kiun li estris nun, restis en la tendaro.

Vigla movado komencis, kiam bolŝevikoj duafoje almilitis Tomsk'on. Mi nun ricevis permeson labori en la urbo kiel lignaĵisto. Dezirante perfektigi en rusa lingvo, mi komencis kun la tri filinoj de mia mastro s-o Samochin Esperantan kurson, kiu kontentigis ambaŭ partojn; sed grandajn malfacilaĵojn oni devis venki pro tuta manko de lernolibroj kaj vortaroj. Dume laboregis la jam nomita samideano Ĥoves kaj revivigis la „Tomaska Esperanto-klubo“-n. Li estis bonega organizanto. Malgraŭ ke la klubejo ne estis hejlita — ĉe — 30° C! — la kunvenoj estis bonege vizititaj. Nia prezidanto estis la bonega Esperantisto D-ro Skalski, profesoro ĉe universitato. La diskutoj okazis pro la diversnacieco de la klubanoj nur Esperante, kiujn oni al la rusaj gastoj rusen tradukis. Foje okazis pli longa diskuto inter la rusaj samideanoj kaj la rusaj gastoj. Kiam ĝi finiĝis, unu samideano petis ĝian tradukon Esperante, „ĉar ĉeestis multaj samideanoj — hungaroj kaj germanoj — tute ne komprenantaj lingvon rusan“. Ĉe tiuj ĉi vortoj oni povis konstati fortan efikon je la aktiveblaj gastoj. Bedaŭrinde la instruitaj kunvenoj, kiujn mi vizitis kun la sama sento kiel la pia religiano sian preĝelon, fariĝis baldaŭ malagrabla, ĉar inter la fratan harmonion enŝovigis la malbelsona kanto de l' politiko. Nome, la komunistaj samideanoj klopodis fari el la ĝis nun senpolitika klubo klubon komunistan, kiun intencis kompreneble ĉiuj nekomunistoj prave kontraŭstaris. Sed estis danĝere kontraŭstaris al komunistoj, eĉ al komunistoj-samideanoj. Tio ja estis kontraŭrevolucia krimo, kiu estis ĉe aliaj okazoj milfoje punita per mortpafado. Tamen samideano Matzke defendis la ĝis-nunan regularon. „Se vi deziras Esperantan klubon por komunistoj, vi devas ĝin fondi, sed ne perforti klubon senpolitikan.“ Hungara samideano, estanta bolŝevika komisaro, minacis al li per malliberigo. „Mi vin petas, faru vian devon,“ respondis sam-

ideano Matzke, „por ke la Esperanta mondo vidu la malĝatan spektaklon, kiel samideano arestigis samideanon.“

|| Tamen, se oni konsideras la cirkonstancojn, estas la bolŝevikaj samideanoj pardonindaj; ĉar multaj — ne ĉiuj — estis ebriligitaj de la revolucio kaj la granda, neatendita sukceso. Krom tio ĉiuj subite akiritaj potenco delogas al fluo. Ankaŭ al ili oni devas apliki la proverbon: „Ĉion kompreni signifas ĉion pardononi.“

La Esperanta movado de la tuta Siberio estas dispecigita en tiaj lokaj partoj, ĉar komuna laboro dum tiu tempo ne ekzistis kaj ne estis ebla pro malbona funkciado de la poŝto. Ni estis izolitaj kaj ofte ne scitis, kio okazas en la najbarurbo. Nur de tempo al tempo ni ricevis la „Japanan Esperantiston“, kiu estis nia sola ĵurnalo Esperanta. Kelkfoje oni aŭdis ankaŭ pri la fama pastro-Esperantisto Seriseven Barnaul, kiu siatempe preparis vortaron.

Jen la loka historio de Esperanto en Tomsk'o de la 14-a ĝis la 20-a jaro. Se estonte estos skribota „La tutmonda historio de Esperanto“, ĝia ĉapitro „Siberio“ konsistos el similaj mozaikeroj.

Th. Killan,
del. de UEA
Aschmeritz, Ĉeĥoslo.

Flugfolieto.

Kun malĝojo ni Esperantistoj vidis la eksplodon, la disvolviĝon kaj la longan daŭron de la universala milito. Kiom da sukcesoj atingitaj per Esperanto, kiom da esperoj por ĝia esonteco detruis tiu internacia buĉado. Sed fine ankaŭ tiu terura ĉeĥis kaj ni ekspiris pli libere esperante, ke la milito — kvazaŭ fulmotondro — estus puriginta la internacian atmosferon por longa tempo. Efektive, en la komenco de la postmilita periodo, ŝajnis, ke nun fine regos trankvilo en la mondo. La internaciaj rilatoj lomi post lomi reviviĝis kaj jam la tutmondaj Esperantistoj reetendis al si reciproke la manojn...

Sed, ho ve! Denove ekaperis nigra nuboj ĉe la horizonto. Ĉi tie kaj tie ekflamis fulmoj, — la mondo ne ĝuos la feliĉon de daŭra trankvilo. Ni vidas kun bedaŭro, ke ankoraŭ *frat' frat' atakas ŝakale*. Mizeruloj ĉion perdintaj, tute senarmilaj, estas perforte atakataj, por ke oni prenu de ili la lastan havon. La demando pri kulpulo ne koncernas la Esperantistojn. Ili ne estu juĝantoj, sed helpantoj. Ni vidas staton, kiun malebligis la Esperantistaro havas la nepran devon! Ili ĉiutage pillatigis sian voĉon postulantante ĉeligon de ĉiuj malamikaĵoj, atentigante pri la teruraj konsekvencoj, se la milito en alia formo daŭras kaj daŭras. Ni zorgu, ke nia anaro ĉiutage kresku kaj kresku. Ju pli multe da Esperantistoj en la tuta mondo protestas kontraŭ la senfina

milito, tiu netolerebla, ĉion detruanta krimo kontraŭ la homaro, des pli oni povas esperi, ke nia voĉo estos aŭskultata, ke nia protesto efikos tiel, ke fine la mondo trovos la trankvilon, kiun ĝi bezonas por kolekti novajn fortojn por novaj kulturaj celoj. Ni ne staru kun krucitaj brakoj kaj ne rigardu silente, sed ni agu, por ke venku la prudento. Je tio nin helpu la vera Esperantismo, kiu postulas la saman ekzistojn por ĉiu nacio.

Antaŭ elektoj por L. K.

En sia cirkulero de 5. nov. 1922 (publikita en ET n-o 113) la prezidanto de la Lingva Komitato sciigis la nomojn de la nunaj L. K.-anoj (entute 79) kaj anoncis, ke en la unuaj monatoj de 1923 okazos la novaj elektoj por la L. K.

Bedaŭrinde ĝis nun ni aŭdis nenion plu pri la elektoj aŭ pri la kandidatoj proponitaj por la L. K. Laŭ nia opinio, la tuta Esperantistaro havas grandan intereson je la personoj, kiuj estas nove elektotaj en la L. K.-on. Ni scias, ke la malnova L. K. konsistis grandparte el personoj tute netaŭgaj por tiu ofico, kiuj nur pro sia rango aŭ nomo, aŭ pro tio, ke ili hazarde troviĝis inter la unuaj Esperantanoj, estis akceptitaj en la L. K.-on. Kelkaj el tiuj unuaj tempaj L. K.-anoj hodiaŭ apenaŭ sci-

povas Esperanton, ne apartenas al iu Esp. grupo aŭ asocio, ne abonas iun Esp. gazeton, ne skribas iun artikolon pri aŭ en Esperanto, mallonge — absolute nenion faras por Esperanto kaj tamen fanfaronas per sia titolo de L. K.-ano.

Hodiaŭ, feliĉe, ekzistas preskaŭ en ĉiu lando lingvospartaj kaj agemaj Esperantistoj. Hodiaŭ ne plu estas necese rigardi alian rangon, sonantan nomon kaj titolon, hodiaŭ oni devas konsideri ĉefe, se ne ekskluzive, perfektan scipovon de Esperanto kaj samtempe vigan agemon por nia afero. Tiaj personoj, ekzemple, estas frukto-donaj aŭtoroj de bonstaj originalaj Esp. verkoj aŭ tradukoj, majstroj de nia lingvo, kiel Luyken, Baghy, Kalocsay, Legrand, lingvospartaj eldonistoj aŭ redaktoroj kiel Ellersiek, Zanoni, Atanasoff, aŭtoroj de gravaj, fidindaj gramatikoj kaj vortaroj k. s. Sed oni ne elektu iun grafon aŭ baronon nur pro tio, ke li havas altan titolon, iun grandkomerciston aŭ bankiston nur pro tio, ke li estas milionulo, iun profesoron nur pro tio, ke lia scienco famo estas granda, iun fraŭlinon aŭ sinjorinon nur pro tio, ke oni volas konsideri ankaŭ la virinan sekson, iun grizharulon nur pro tio, ke li estas respektinda maljunulo aŭ bona homo, — indiferente, ĉu ili scipovas Esperanton perfekte

Foje Ludoviko, irante hejmen, malbonŝance perdis sian domŝlosilon — la ĉielo scias, pro kio! Li sonorigis forte per la doma sonorigilo. En la unua etaĝo fenestro malfermiĝis kaj lia edzino rigardis malsupren.

„Angelika, mia karega edzino, bonvolu malfermi la dompordon! Mia domŝlosilo ŝajnas esti malaperinta en nekomprenebla maniero.“

Sed la karega edzino kun ironia ridado diris: „§ 1.“

Poste ŝi fermis la fenestron kun granda bruo. Al la malagrabla surprizita edzo restis neniu alia eblo, ol iri en iun noktkafejon kaj tie atendi la venontan matenon.

Depost tiu tempo Ludoviko ĉiam prenis kun si du domŝlosilojn, unu en la dekstra, duan en la maldekstra pantalonpoŝo. Sed al sia edzino li nenion diris pri ĉi tiu kontraŭrimedo.

Cetere Angelika nur malmulte interesiĝis pri la privataj aferoj de sia edzo. Ŝi ofte vizitis sian amikinojn, la edzinon de la pentristo L., ĉe kiu ŝi kun granda ĝuo rigardadis la diversajn artobjektojn.

Sinjoro L. estis, same kiel la bankisto, fervora ano de la klubo „Fraŭlaj edzoj“. De li Ludoviko iun sabaton en la klubo aŭdis, ke lia Angelika ree estis vizitanta la edzinon de L. Brillanta ideo ekfulmis en lia cerbo.

„Kara amiko,“ li diris, „vi povus fari al mi grandan komplezon.“

„Ho tre volonte!“

„Ĉu vi ne povus havigi al mi la domŝlosilon de mia edzino? Ŝi portas ĝin ĉiam en sia nigra manpoŝeto, sen kiu ŝi neniam forlasas la domon.“ Post mallonga meditado L. respondis:

„Mi esperas, ke tio estos ebla; ĉar via edzino kutime metas sian manpoŝeton sur la tableton en la koridoro de nia loĝejo. Mi senbrue

aŭ nur balbute, ĉu ili ageme partoprenas en la movado aŭ eĉ ne interesiĝas pri ĝia evoluado.

Ni rememoras, ke dum multaj jaroj oni plendis pri mallaboremo de la lingvaj institucioj. Kaj, travidante la liston de la 79 restintaj L. K.-anoj, ni efektive trovas ankoraŭ kelkajn nomojn, kiujn ni ne legis nek aŭdis de jardeko. Ni do elektu por la lingvaj institucioj estonte nur personojn, kies lingvosparteco kaj agemo estas sufiĉe konataj por ke ni ne plu havu kaŭzon je plendo.

ET — ne amuzilo, sed privilegio pri utileco de lingvo internacia.

De konata franca samideano ni ricevis sekvantan leteron, kiun ni rekomendas al la atento de niaj legantoj. Por sciencaj informoj ni intencas krei koncernen rubrikon, kiam niaj teknikaj instalaĵoj permesos alianĝon (pliperfektiĝon) de ET. La proponon pri la komerca informo laŭeble utiligos nia komerca redaktoro en „Internacia Komercio“. Jen la letero:

Ju pli mi legas vian ĵurnalon, des pli mi estas konvinkita, ke grava evoluado ĉe ĝi fariĝas necesa. Vi ne eldonas ĵurnalon por amuzi la Esperantistojn, vi eldonas ĝin por pruvi al la mondo (eĉ neesperantista) la senmezuran utilecon de universala lingvo. Por tio, la plej efika rimedo ne estas literaturaj aŭ propagandaj artikoloj, ĝi estas montri praktike vian utilecon, donante al la leganto informojn, kiujn li tre malfacile povus havi per naciaj ĵurnaloj kaj kiuj estas utiligeblaj en iu ajn parto de la mondo. Tiaj estas, antaŭ ĉio, la sciencaj kaj, speciale, la komercaj informoj.

Vi devas do peti al ĉiuj viaj legantoj aŭ korespondantoj sendi jenajn informojn:

1. Sciencaj informoj pri la novaj praktikaj elpensaj naskiĝintaj en iliaj respektivaj landoj. Tiaj artikoloj devas esti kun iom pli da praktikaj detaloj kaj eĉ kun klarigaj bildoj, donante laŭeble ankaŭ la nomon de l' inventinto.

2. Komercaj informoj. Petu al ĉiuj viaj korespondantoj en ĉiu lando liston de la plej bezonataj objektoj en iliaj landoj kaj samtempe liston de la materialoj kaj objektoj havantaj (ĉe ili) troan produktadon kaj kiujn oni deziras eksporti.

Vi tuj komprenos, kian mirindan amplekson tiu uzado de komercaj informoj povos akiri, per Esperanto ili povos penetri en la plej malproksimajn partojn de la mondo, al la mil nacioj parolantaj mil malsamajn lingvojn. Mi opinias, ke — eĉ kun la nuna negranda disvastiĝo de Esperanto, tia organizo povus jam fari ŝatindajn servojn al la komercantoj, sed ke — post la ĝenerala diskonigo de nia lingvo — la komercaj interŝanĝoj kreskus laŭ amplekso, kiun la plej optimista imago ne povas taksii. Estas mirinda revolucio, kiam la ĉiulandaj komercistoj povas sendi nurunulingvan katalogon pri siaj produktaĵoj.

Estas facile kompreneble, ke tiu ĝenerala diskonigo de Esperanto povas okazi nur per sinkvalaj paŝoj. La progresemaj komercistoj devas vidi tiun evidentecon kaj helpi la unuajn paŝojn de la afero.

Do, konklude, mi ripetas, ke vi devas fari alvokon al la tutmondaj samideanoj por la starigo de via rubriko pri praktika scienco kaj speciale de la listo ĉiulandaj de eksporteblaj aŭ importeblaj objektoj, samtempe ankaŭ, por ke ili havigu al vi reklamojn pagatajn de diversaj komercistoj, al kiuj ili devas facile montri sian evidentan frukto-donemecon, kiu fariĝos tiom pli granda, ke — per ilia partopreno — nia internacia movado prenos pli kaj pli gravan amplekson.

E. A.

kaj fariĝi interesa... Post tiu unua rendezuo longe ne venis letero. Li skribis petante klarigon. Li eĉ kuragiis denove peti pri permeso akompani ŝin. Venis respondo nea. „Mi preferas,“ ŝi skribis, „legi viajn belajn leterojn, mi ŝatas ilin, sed ne postulu de mi rendezuojn!“ Li do plu skribadis sole leterojn al ŝi, konata jam por li, adorata jam de li! Ĉar pri tio li ne dubis eĉ post la interkonatigo. Sed li sentis, ke ŝi pentris al si en la fantazio alie „la princon de siaj revol“. Li suferis kaj suferante li havis komprenon ankaŭ por suferoj de aliaj. Tiel okazis, ke li ekentis simpation por unu el la kursantinoj kaj ke tiu simpatio fariĝis reciproka. La nova amliĝo forigadis nerimarkeble, ĝis fine venis la tempo de decido pri edziĝo. Li sciigis tion al sia ĉiama korespondantino. Ŝi reskribis; „Mia amata! Kiel vi ĉagrenis min per Via letero! Ĉu vi ne ekkonis, ke mi Vin ankaŭ amas? En la vesperoj, sidante ĉe fenestro mi ofte pensis je vi, revadis pri nia estonta vivo, feliĉe, kiel roza burĝono, kiu aspiras je plena vivo kaj juĝo — Vi — pikis...“ Li ne povis tion finlegi, li alklinis la vangon al la letero, kuŝanta sur la tablo kaj ploris singulte. Haoso de pensoj: „Ĉu mi povas, mi kapablas pikti, vundi rozon? Kion fari? Ĉu reveni al ŝi? Ne, ne estas eble...“ Kaj li respondis: „Kara Flonjo! Doloro plenigas mian internon. Kiel vi ne diris tion pli frue? Mi opinias, ke mi ne plaĉas al vi persone. Vi plifirmigis mian opinion per Via skribmaniero. Kiel volonte mi revenus al vi, mia kara, kun kia plezuro mi kise tuŝus viajn okuletojn kaj... mia Dio, ĉio for! Mi jam ne povas cedi, ĉar mi promesis al la animo, kiu min amas laŭ mia penso kaj eĉ laŭ mia eksteraĵo, ke mi iros kun ŝi en mia estonta vivo, kaj ne plenumi mian promeson — kredeble kaŭzus eĉ pli grandan doloron ol adiaŭi kun vi. Dio scias, ke mi Vin

amis sincere kaj ke tiu amo ankoraŭ ne foriĝis el mia koro, kiu sangas... Sed estas pli bone, ke sangu mia koro kaj doloru la Via por kelka tempo ol ke rompiĝu la koro de tiu junulino, al kiu mi jam promesis edziĝon... Adiaŭ!“

Du monatojn post tio anonciĝis en ĵurnaloj nova Esperantista paro. Post la edziĝofesto ili forveturis el Praha kaj ekloĝis en kampara urbo, kie li fariĝis profesoro de lingvoj. Ili vivis kontente, trankvile. Ŝi bone mastrumis, li bone manĝis kaj trinkis, iom grasiĝis kaj eĉ nun diadadis pri si, ke li estas idealisto ne kapabla iun vundi aŭ pikti. Sed interne li tion ne kredis kaj okaze ekvidinte le blankan rozon li ĉiam malĝajliĝis kaj kun sopiro rememoris sian unuan neforgeseblan amon.

La domŝlosilo.

De D-ro Joh. Ev. Schweiker.

La bankistaj geedzoj Ludoviko kaj Angelika estis finintaj sian jam dek jarojn daŭrintan edzeccan milion. La packontrakto enhavis nur du punktojn:

§ 1.

Al neniu geedza partio estas permesite, ĝeni la alian.

§ 2.

La kontrakto estas nuligebla nur per komuna konsento.

Kaj la edzeca paco daŭradis kaj estis granda beno por ili ambaŭ.

Ĉiusabate Ludoviko vizitis sian klubon „Fraŭlaj edzoj“, kie ĉiam regis petolado kaj distriga interparolado, tiel ke ofte nur en malfrua nokthoro li iris hejmen al sia ĉarma kampara domo antaŭ la urbo.

Antaŭkongreso en Paris.

(28.—30. de julio 1923.)

La Esperantistoj de la Pariza Regiono organizas antaŭkongreson en Parizo de la 28 ĝis 30. de julio 1923. La antaŭkongreso konsistos en: vizitado de la urbo kaj de Versailles, teatro kaj komuna festeno.

La aliĝo estas fiksata laŭ tia bazo: Francio: 5 fr. frankoj; Belgio: 5 fr. frankoj; Svisio: 5 sv. frankoj; Ameriko: 1 dolaro; Hispanio kaj Katalunio: 5 pesetoj; Nederlandanoj: 2 guldenoj; Anglio kaj britaj kolonioj: 5 ŝilingoj.

Sendu ĉiun komunikojn, kun respondkuponon kiam bezonas, al s-o P. Petit, ĝenerala sekretario de la Antaŭkongreso, 59, Rue de Neuilly, Rosny-sous-Bois, Seine, Francujo.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Adresaro Katolika tutmonda.

IKEO (Internacia Katolika Esperanto Oficejo), eldonos dum la jaro 1923 internacian katolikan adresaron de katolikaj Esperantistoj. Ĉiu katolika samideano povas publikigi sian adresaron kun mallonga rimarko: PM, L, PK, ktp. Informojn donas IKEO, Graz, Karmelferplatz 5, Aŭstrio.

Oficialaj kursoj de Esperanto en Ĉeĥoslovaka armeo.

La soldatiĝantaj samideanoj en Ĉeĥoslovakio laboras en multaj lokoj kaj ĉe pluraj armeopartoj inter la ĉeĥoslovaka soldataro por nia afero. Lasttempe estis anoncita fermo de bone sukcesinta kurso gvidita de s-o Jan Basil en Bruntál (Silezio) kaj nun venas sciigo pri dua oficiala kurso de Esperanto aranĝita de regimenta kleriga fako en Klatovy (okcidenta Bohemio). La kurso estis speciale anoncita de la komandanto al ĉiuj soldatoj de la regimento kaj interesa estas la strikta ordono donanta la detalojn pri la vizito. Pro ĝia vere sencenermonia soldata stilo ni citas jene la ĉefajn partojn: Ordoni de la rajdisto regimento n-o 4, Kleriga fako: II-a kurso de Esperanto — malfermo. En la kurson sin anoncis . . . de la unua, dua, tria, teknika, rezerva eskadrono . . . entute 24 lernantoj. Instruas kaporalo Jaroslav Šustr en la nova leĝejo ĉiun mardon kaj merkredon de la 17-a ĝis 18-a. Instruilojn donos la komandanto de la ŝtoba eskadrono. La soldatoj aliĝis al la kurso propravole, la vizito estas tial deviga por ili. Senkaŭza foresto estos punata kiel malbonuzo de koncedita avantaĝo. La komandanto zorgos, ke la vizitantoj de la kurso estu por la leciono tute liberaj. Eventualaj malfacilaĵoj estu anoncintaj al la regimentsestro. La instruanto donos pri ĉiu leciono detalan raporton enhavantan koncizan priskribon de la instruotaĵo, la nomojn de la mankintaj lernantoj, proponojn ktp.

Svizaĵoj.

En St. Gallen la Esp. grupo aranĝis por membroj kaj geamikoj Zamenhofan feston. Paroladis s-o Kŭrsteiner pri la vivcelo de Zamenhof kaj s-o Fischer pri sia vizito de la kongreso en Helsinko. Dank' al la penado de aninoj la festo plibeligis ankoraŭ per teatraĵo, muziko, kanto kaj danco.

En Frŭmsen malfermiĝis kurso kun 26 lernantoj de duagrada lernejo.

En Zŭrich 9.—10. dec. okazis la ĝenerala kunveno de Svisa Esperanto-Societo, kiun ĉeestis delegitoj el 15 urboj. Oni reelektis D-ron Privat kiel prezidanton de Centra Komitato. En Svisujo okazis dum pasinta jaro 72 Esp. kursoj, el kiuj 17 en popollernejoj, 2 en gimnazioj kaj 1 en komerca lernejo.

En Rorschach kaj Goldach komenciĝis novaj kursoj. Por tiu ĉi celo la lerneja estraro disponigis lernejan ĉambelon senpage.

Ne respondante Ludoviko eligis el siaj pantalonpoŝoj tri domŝlosilojn kaj metis ilin sur la tablon. Angelika estis senparola pro mirigo. Kaj nun ŝia edzo klarigis al ŝi:

„Tujn ĉi du mi fabrikigis al mi post la perdo de la unua, same kiel vi faris. Kaj tiun ĉi trian mi trovis — tiel li kuraĝe mensogis — antaŭ kelkaj tagoj ne malproksime de nia dompordo.“ Kaj sinjorino Angelika kredis tion.

Aforismoj el rusaj aŭtoroj.

La esenco de la arto — la persono de la artisto. Valerij Briussov.

Ne ekzistas la estonteco — ni kreas ĝin. L. Tolstoj.

Nuntempaj homoj ne serĉas la venkon, sed la famon. Ne la laŭra krono estas agrabila al ili, sed la aplaŭdoj al ĝi. Valerij Briussov.

Stultulo meditas dum sia tuta vivo pri tio — kial la vitro estas trarivebla; dume la fripono faras el vitro botelon. Maxim Gorkij.

Vivo persona, individua estas iluzio; ni ĉiuj estas ies iloj. L. Tolstoj.

Ni loĝas en malbona domo, kies fundamento staras sur kadavroj, sur duonmortintoj, sur turmentatoj. D. Balmont.

La sklavo vivas en la revo pri la libero, la tirano — en la timo pro sia perforto. Maxim Gorkij.

Respondu per la bono al la malbono, vi nenlĝos en la malbonulo la plezuron ĝui sian malbonon. L. Tolstoj.

Se la homo fariĝus Dio, lia trono estus — la libro. L. Andrejev.

Estonujo.

En Tallinn la loka grupo „Espero“ aranĝis festeton je rememoro de la aŭtoro de Esperanto. Okazis paroladoj, solkantoj kaj deklamoj. Ĉie sonis Esp. ĥabladado. — La datreveno de la naskiĝtago de Zamenhof estis festenita ankaŭ en elementa lernejo, kie f-ino Lŭbek instruas Esp. en la plej supera klaso, per tevespero. Ĝin partoprenis 23 junaj lernantoj. Kiel gastoj ĉeestis la estrino de la lernejo s-ino Ollik kaj Esperantistino f-ino H. Dresden. — La 31. dec. la debata rondo de la grupo aranĝis paroladvesperon, dum kiu s-o P. Berg paroladis pri „livoj“, ilia historio, literaturo kaj lingvo. Post la parolado 15-jara f-ino R. Lŭbek deklamis kelkajn poeziaĵojn en la viva lingvo kaj Esp. traduko. Oni sendis al la nuntempa sola viva poeto K. Stalte salutleteron kaj gratulis lin pro lia deziro ellerni Esperanton. — En la jarkunveno de „Espero“ la prezidanto informis, ke la societo havas 280 anojn, el kiuj 150/0 ne loĝas en Tallinn. Estas rimarkinde, ke 1/3 de la societanoj estas lernejoj. Dum la pasinta jaro okazis en Tallinn plural paroladoj pri Esp.: s-o Joger en la Tutlanda Junulara Ligo, s-o Vaher en YMCA, s-o Punsepp en la vespera mezlernejo kaj s-o Cher en la instruista seminario, dum s-o Sakaria paroladis en Pärnu. La kunveno ĉeestis pli ol 50 personoj, kies vigla flua interparolado en Esp. videbligis grandan progreson: antaŭ 3 1/2 jaroj dum la fonda kunveno la oficiala lingvo estis la estona, dum nun la „Esperanto“ indigne rifuzos proponon pri uzado de nacia lingvo dum kunveno de Esp. societo.

La 3. Konferenco de la Sudokcidenta Federacio Esperantista (Britujo)

okazis 27. jan. en la bela marborda urbo Torquay. 20 delegitoj de diversaj federitaj grupoj partoprenis kaj vigle diskutis la vojojn kaj manierojn de Esp. propagando. La delegito de Bourmouth raportis pri la organizoj kaj antaŭarangoj jam faritaj rilate al la Brita Esp. Kongreso okazonta en tiu urbo dum pentekosta semajno. D-ro Privat promesis veni Anglujon pro la kongreso.

Ĉi tiu juna Federacio, kiu naskiĝis nur en 1922, jam montras signojn de vigla vireco, kaj sub la lertaj manoj de la sekretarino f-ino E. Hogg, la instruistino de la fama Eccles-lernejo, ĝi certe ludos ne malgravan rolon en la rapida evoluo de la Esp. movado en la sudokcidenta regiono de Anglujo.

S-o J. Merchant, prez. de Brita Esp. Asocio, speciale venis por fari propagandan paroladon sub la prezido de la urbestro. Ĉeestis tiun kunvenon multaj edukistoj. La ĉeestanta sekretario de la Edukado Komitato sciigis, ke la Komitato tute favoras la enkondukon de Esp. en lernejojn, se la lokaj Esperantistoj faros formalan postulon per loka deputacio.

La sekretario de Zamenhofa Monumento, kiu ankaŭ ĉeestis, profitis la okazon por kolekti monon kaj havigi agentojn por la monokolekto (mono kolektita dum la konferenco 25 ŝil.). J. D. A.

Pri „Settlemento“.

Ĉar diversaj legantoj esprimis la deziron sciigi ion pli detalan pri ĉi tiu movado, pri kiu ni publikigis en la antaŭa numero artikoleton kun bildo, ni represas ĉi sube mallongan klarigon riceviton de la Settlement-a Esp. Societo „Fratego“ en Helsinko:

„Settlement“ estas angla vorto, kiu signifas „loĝiĝado“. La ideo de „Settlement“-movado estas, ke instruitaj homoj libervole donu sian instrucon kaj spiritan posedon al homoj, al kiuj tiuj mankas. En la plej unua formo ĉio okazas tiel ke ekz. studentoj ktp. loĝiĝas ĉe malriĉaj familioj kaj personoj por ilin helpi spirite kaj materiale, eĉ por lerni de ili. Plej vaste kompreneble signifas la settlementa movado interpacigon inter la posedanta kaj laborista klaso.

Kleruloj, kiuj uzas sian scipovon ne por la klerigo kaj liberigo de la laborista klaso, sed por ĝia sklavigado, similas al tiuj, kiuj uzas sian forton por nenigi la vivon anstataŭ ĝin subteni. L. Tolstoj.

Parolu malmulte, precipe kun homoj, kun kiuj vi volas esti amikoj. L. Tolstoj.

Nur tiam estas permesite al homoj sin okupi pri si mem, kiam li estas malfeliĉa. L. Tolstoj.

De kiam la mondo ekzistas, oni jam vidis virinojn bonajn, saĝajn, sed neniam — virinon justeman. L. Andrejev.

Trad. Alexandra Mexin.

Mezepoko.

Al mia kara amiko-frato, hungara samideano s-o Julio Rakusz.

En land' malproksima, post montoj sub neĝo, De sia popolo kaj kortego amata, Vivis maljuna kaj gloriplena reĝo, En forta kastel' kun edzin' adorata . . .

Dudekjara nobelo, tre brava kaj lerta, Estis paĝo de l' juna reĝin' . . . Li estis tro bela, ŝi estis malsperta, Kaj fine ŝi iĝis por li, amatin' . . .

Tre ofte dum noktoj pasie belsonaj, Mallaŭtaj akordoj de lia gitar' Elvokis reĝinon eliri balkonon, Dum dormas trankvile maljuna la car' . . .

Sed estis pri tio la reĝ informita' . . . En sia kolero li estis terura . . . Laŭ lia ordon' estis paro punita Per mort' je malsato en kelo de turo . . .

La vorto „settlement“ ne estas konata en Germanujo. Oni nomas „settlementojn“ tie „Soziale Arbeits-Gemeinschaft“. Tian gvidas ekz. en Berlin pastro Siegmund Schulze. Ankaŭ pastro Moennicke laboras en tia movado.

Aarne Selinheimo
prez. de Esp. Soc. Fratego
Helsinki, Konstantina str. 25.

La Internacia Blindula

Centra Informejo kaj Statistikejo en Praha, fondita dum la II-a internacia kongreso de blindaj Esperantistoj en Helsinko, ekfunkciis. Instituto, kies gravecon povas prijuĝi ĉiuj porblindulaj laborantoj, kaj kiu bedaŭrinde ne troviĝas ĝis nun inter la oficialaj porblindulaj aranĝoj, ekzistigas kiel memhelpa entreprenado de blindaj samideanoj. Jen nova okazo por pruvi taŭgecon kaj valoron de Esperanto! Ekzistas certe inter la diverslandaj samideanoj multaj, kiuj povas helpi sukcesigi la novan entreprenon per gravaj sciigoj koncerne la blindularon ĝenerale (ne sole blinduloj-Esperantistoj), ĝian moralan kaj materialan statojn, lernejojn kaj instituciojn porblindulajn en sia lando ktp., ĉio, kio estas iom signifa en la vivo de neviduloj. Sciigoj tiuspecaj estu adresataj al s-o prof. Stanislav Stejskal, Praha-Smichov, Komenského ul. 11.

La granda internacia transportentrepreno Carl Lassen

(Berlin NW 21, Alt-Moabit 94) kiu posedas pli ol sesdek proprajn filiojn en Germanujo kaj la eksterlando, oficiale aprobis Esperanton kiel taŭgan internacian helpilngvon kaj por tiu kaŭzo aranĝis specialan Esperantan Fakon por siaj klientoj.

La priinteresaĵoj estas petataj uzi la peradon de la firmo por siaj transportoj, enmagazenigoj, asekuroj, ktp. por provi tiamaniere la taŭgecon de Esperanto por komercaj celoj. La firmo havas vastajn magazenojn kun modernaj leviloj, vagonetoj k. a., mulinombnan veturilaron por la akcepto de la sendotaĵoj, taŭgajn transportilojn por ĉiuspecaj artikoloj. Specialaj transportaj interligiloj estas subtenataj al Skandinavulo, Polujo, Balkano, Anglujo, Hispanujo, Afriko, kaj la Mediteraneaj kaj Transmaraj landoj. Aparta oficejo okupas sin per senkosta perado de interlandaj komercaj rilatoj, por kiu celo ĝi estas tre kapabligha posedante grandan klientaron.

Fine la Esperantistaro estas atentigata, ke la firmo posedas propran filion ankaŭ en la loko de nia XV-a, en Nürnberg, Eilgutstr. 5. Ĉiuj leteroj komence estu direktitaj al Carl Lassen, Berlin NW 21, Alt-Moabit 94 (Esperanto fako).

Diversaĵoj.

Aŭstria Mizer.

—ng— El Wien oni skribas al ni: La mizer, pli ol la kontraŭ-alkohola movado, devigas la Wien-anon trinki akvon anstataŭ vino. La restoraciestroj tial postulas pli altan prezon por la manĝaĵoj „sen vino“ aŭ — pagon por la akvo. Lastatempe oni akuzis Wien-an restoraciestron pro tropostulo, ĉar li postulis 50 kronojn por glaso da akvo, kvankam la „Oficejo por Kontrolado de la Prezoj“ deklaris, ke kr. 20.— sufiĉas. La advokato de la restoraciestro klarigis: Se oni supozas, ke „Pikkolo“ (tiu estas la Wien-a esprimo por kelnera lernanto) servas la akvon kaj uzas por tiu procedo 2 minutojn, tio kostas kr. 48.60 da salajro, sed se la kelnero servas, la salajro por 2 minutoj estas kr. 114.60. Krom tio la purigistino devas esti pagata, kaj ankaŭ la risko pri detruo de la glaso kaj la ĝenerala elspezo de la restoracio estas konsiderindaj. La juĝisto saĝe decidis, peti pri tio la opinion de eksperto . . . Demando: kiom li kostos?

Vivadis laŭ viv' ordinara kastelo,
Forgesis loĝantoj pri sorto de l' par'.
Sed iu rakontis, ke foje el kelo
Aŭdiĝas plorego kaj son' de gitar' . . .

Centjaroj forpasis . . . Sur lok' malbenita,
Sur loko de l' amo kaj de kruela', —
Nun estas ruino — la tur' trafendita,
Ois supro kovrita per verdheraĵ' . . .

En tiu ĉi turo, rakontas la homoj,
Aŭdiĝas, dum noktoj, antikvaj la kantoj . . .
En grandproces' tie marŝas fantomoj,
Kaj iras kun ili la du geamantoj . . .

Reĝo per ago, maldeca kaj besta,
Rompis la vivon de sia rival',
Sed ĉiujare edziĝa la festo
Tie okazas subtera en hal' . . .

Laŭ malnova temo.
Kazan, 1919.
Originala.

Vadim' Obrazcov.

Literaturaj Manuskriptoj.

Al ĉiuj sendantoj de literaturaj manuskriptoj ni sciigas, ke ni neniam iuj povas respondi, ĉu ni represas la verkojn al ne. Pri tio decidis nur Zanoni. Sendintoj do bonvolu daŭre atendi la jenan urbrikon, en kiu ni respondoj al ĉiu iuj post decido pri akcepto aŭ neakcepto. Kiam ni enpresas la akceptitan artikolon, tio dependas de aktualeco, disponebla spaco kaj aliaj cirkonstancoj.

Ricevitaĵoj:

368. Vivo-songo (A. M.), 369. La granda striko (Gorbunov-Posadov), 370. De la vivo (S. V.), 371. La dudimensa spaco (O. P.), 372. Karulo kaj nekarulo (S. P.), 373. Laŭdu la Majstron! (V. A.), 374. La stranga pordo (A. H.), 375. Fabeloj (Sologrub).

Akceptitaĵoj:

254, 285, 286, 287, 288, 289, 292, 294, 335, 336, 337, 338, 343, 344, 345.

Ne akceptitaĵoj:

253, 260, 261, 334, 335, 346.

Prokrasto

en la alveno de ET nuntempe estas neevitebla, pro la Ruhr-okupado kaj ĝiaj konkvencioj (neregula funkciado aŭ tuta ĉesigo de funkciado de la fervoj-linioj en Rejnlando-Vestfalio). Ni petas la paciencon de niaj legantoj, ĉar ni ne estas kulpaj pri la malagraba situacio, kiu espereble baldaŭ pliboniĝos.

Parolejo.

151. Al la PM-kolektantaro tutmonda!

La kolektado de PM okupas jam tre vastan teritorion en Esperantujo, sed mankas al la kolektantoj la plej rapida ilo por la scigado de la novaĵoj aperintaĵoj.

La kolektantoj estas devigataj atendi ĝis la naclingvaj gazetoj raportas pri la novapertaj PM de la diversaj landoj, kio ofte tre longe daŭras, ĉar la raportoj devas esti tradukitaj divers-naclingven.

Ni PM-kolektantoj Esperantistaj povus fari tre grandan servon al la tutmonda kolektantaro, se ĉiu PM-kolektanto raportus pri novapertaj PM de sia lando iuj post la eldono al ET, kiu la raportojn enpresigus. Tiamaniere povus esti sciigata la Esperantista PM-kolektantaro ĉiusemajne pri la lastaj novaĵoj el PM-kolektantujo. Se la raportintoj ĉiam aldonus la nombron de la noveldonataj serioj aŭ pecoj kaj plue ankaŭ la kialojn de la nova eldono, ni havus ĉiam tre kompletan imagon de la stato de nia amaraĵo. Se plue diversaj kolektantoj tradukus la raportojn de ET naclingven kaj fordonus tiujn tradukojn al la naciaj jurnaloj kaj PM-gazetaro naclingva, ni Esperantistoj pruvus al la kolektantaro de PM la grandan valoron de Esperanto, kaj ferus ankaŭ tre grandan meriton al Esperanto mem, ĉar ni certe gajnus per tia metodo multajn konviktajn amikojn. F. B. F.

152. Pri esprimo „helpa lingvo“.

Legante pri Esperanto, oni ofte trovas la nomon „helpa lingvo“. Tiu ĉi atributo estas tre malutila por nia afero, ĉar personoj neclantaj pri la graveco de internacia lingvo, erare opiniis, ke Esperanto estas ilo por la helpo al aliaj lingvoj de la tuta mondo. Mi havis interparoladojn kun multaj personoj pri Esperanto. Ili rekte esprimis tiun penson, ke Esperanto servas al la aliaj lingvoj; kelkaj homoj diris, ke Esperanto nur servas al la internacia lingvo. Sed ja en la mondo ne ekzistas ankoraŭ internacia lingvo, de ĉiuj popoloj akceptita. Internacia lingvo estas efektive nun Esperanto. Por ni estas tre grava la propagando de Esperanto, sed la nomo „helpa lingvo“ rekte malhelpas al tio. Laŭ mia opinio ni devas konstante ĝin nomi nur „internacie lingvo“ kaj neniam uzi la atributon „helpa“ rilate al Esperanto. (P. Ernits, Valk, Estonio.)

153. Dezirata enhavo de ET.

Tiaj artikoloj de ĝenerala internacia intereso, kiaj estas ankaŭ speciale interesaj al Esperantistoj, ekz. Filatello (kvankam min tiu ne interesas).

Ĉio pri internaciaj komunikoj, volaĝoj, longdistanca telefonado aŭ telegrafio, la internacia poŝto, ĝia tarifoj, poŝtpreparado, borzo, tunelo inter Britujo kaj la kontinento kaj inter Gibraltaro kaj Afriko.

Aranĝoj pri vizitoj kaj rajtoj de vizitantoj, alilandanoj. Komparado de leĝoj inter diversaj landoj, precipe tiuj leĝoj kiuj daŭris jam sufiĉe longan tempon por mezurado de siaj rezultatoj.

Komparado de naturaj lingvoj kun Esperanto. La sporta numero en Esperanto (de Finnlando) dras, ke Esperantistoj skribas nenion pri sporto; legu la unuan pagon! Eble tio estas eraro. Sed tio memorigas min, ke estas bone havi indokson al ET. Mi malŝatis represaĵojn. (Ch.-G. St.-M., London.)

154. Respondo al 153.

Volonte ni publikigas deziratajn artikolojn, se interesatoj kunlaboras.

Speciale pri sporto kaj ludo ni plezure raportus pli multe ol ĝis nun, kaj ni esperas, ke post kelka tempo ni povos efektiviĝi iurilatan deziron.

Recenzoj.

LIBROJ.

HEBREAJ RAKONTOJ. De Salom-Aleĥem kaj Perc. Trad. de Muĉnik, L. K. — Internacia Mondliteraturo, volumo 9. — 78 pg. piace karion. — La aktualan prezon oni demandu ĉe la eldonejo Ferd. Hirt & Sohn, Esp.-Fako, Leipzig.

Salom-Aleĥem kaj Perc — du tre diferencaj tamen tipe hebreaj verkistoj, la unua humoristo, la dua moralisto. Sed diferencaj estas ankaŭ la tradukoj. La ekzemploj el Salom-Aleĥem estas bone traduktaj, sed en la rakontoj de Perc mi trovis diversajn malklarajn aŭ malbonajn esprimojn, eĉ kelkajn gramatikajn erarojn (por dudek kopekojn, anst. kopekoj; la absoluta bona kaj la absoluta malbona, anst. absolute; por ke siaj pekaj ne malkovrigu, anst. liaj). Mi opinias „sufokigi alian“ pli ĝusta ol „sufoki alian“. Kion signifas „envesti pelton“? Estas konsilind, antaŭ dua eldono ankoraŭ zorgi pri labori la tradukojn el Perc. Cetere, oni povus rekomendi la libreton al ĉiu, kiu interesiĝas pri tipe hebra literatura. R-ano.

GAZETOJ.

Germana Esperantisto, febr.
Sennacieca Revuo, febr.
Le Monde Esperantiste, nov.-dec.
Hungara Esperantisto, jan.
Verda Utopio, nov.
Literatura Mondo, jan.
Holanda Esperantisto, 25. jan., 1. febr.
Esperanto-Praktiko, jan.
La Revuo Orienta, dec.
Komunikoj de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, n-o 1.
Norvega Esperantisto, dec.
Esperanto Spritilo, n-o 1.
Kosmoglot, dec.
Bulneto de Centra Komitato de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo, Moskvo, dec.

Leterkesto de ET.

A. S. en Wilno — Ne, sinjoro! Mono ne perdiĝas alvenis eĉ 6000 pmk. Kun nunaj 2000 via abono daŭras ĝis 168.

Esp. Ger. en Sabadell. — Mensejaĵo bone alvenis. Sed via letero ne tute estas komprenebla. Ni daŭrigas sendi 10 ekz.

O. K. en Kolomea. — Admonilo erare estas sendita al vi. Vi ne plu bezonas pagi por 1925.

H. G. en Konstantinopel. — Koran gratulon kaj same koran dankon por la donaco.

P. P. en Jambol — Kvankam la nomitaj numeroj estas ekspeditaj al vi, ni tamen duan fojon sendas 117. 118 estas elciperita.

M. D. en Liako. — Abonpago ĉe ni ne jam alvenis. Via abono daŭras ĝis 153.

Verklisto? en 's-Gravenhage. — Kiu vi estas? Ni ne povas legi vian nomon kaj adreson aŭ via manuskripto de 15. l. „Ni inter popoloj la murojn detruos“. Th. K. en A. — Ni ne povas kvitanci ĉiun abonpagon kaj ne informi ĉiun pri datro de abono. De nun ĉiu ricevos admonilon. Via abono daŭras ĝis 155.

FERDINAND HIRT & SOHN, ESPERANTO-

JUS APERIS:

PRIVAT:
VIVO DE ZAMENHOF
 SPECIALA ELDONO POR MEZ- KAJ
 MALBONVALUTAJ LANDOJ.

SALOM-ALEHEM PEREC:
HEBREAJ RAKONTOJ
 POSTULI NIAN LASTAN PREZARON
 KUN FIRMAJ PPEZOJ LAU NACIAJ
 MONUNIOJ.

FAKO, LEIPZIG, SALOMONSTRASSE 15.

Oni postulu la
 "Victoria"-Ekspert-
 prezistaron

HARDER & DEVOß
 HAMBURG

en germana-hispana
 au germana-angla
 lingvoj.

LAVU VIN

per antisepta sapo „Lisol-sapo“: ĝi freŝ-
 igas la haŭton, evitas malsanon!

RAZU VIN

per antisepta „Lisol-razpasto“: ĝi malebl-
 igas ekzemojn, forigas la brulon post la
 razado.

Specimenoj po gmk. 150.— inkl. sendk.
 per

**ESPERANTO KOMERCISTA
 GRUPO DRESDEN N.**

Vi multe profitos aĉetante miajn specialaĵojn.

Batista, luksa tolaĵo
 Spec. subfaloj
 Broditaj naztuko.

Tablotuketoj en modernaj artaj mo-
 deloj, broditaj, mantrikitaj kaj
 mane punfaritaj.

— Revendistoj ĉie serĉataj! —
 Max Huthmann, Dresden, A. 19, Hübnerstr. 1.

NEDERLANDA ANONIMA SOCIETO

LUKSA-PANO FABRIKOJ

ANTAŬE HENRI J. CARELS.

50 BUTIKOJ: DEN HAAG, HAARLEM, AMSTER- DAM.	LUNĈEJO CARELS (ĈEFO: H. A. SCHAR- WÄCHTER.)	DEN HAAG, 63 WEIMAR- STRAAT. ONI PARO- LASESPER- ANTON.
---	--	--

**SUOMI
 FINLAND**

FINNLANDA FOIRO
 HELSINGFORSO
 INTERNACIA. ĈIUJARE.
 1-6 DE JULIO

Abonejoj de ET
 en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchenberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II, Postamt 34.

Belgia: Frans Schoofs, 48, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtadreso n-o 28420.

Brazila: Brazila Ligo Esperantista, Praça 16 de novembro, Rio de Janeiro.

Bulgara: Georĝi Frit. Golevski, Bul. Maria Luiza 46, Sofia.

Ceĥoslovaka: Otto Sikenka, Hradec Králové, Otto Lumpe, Trautenau.

Dana: Est. Esp. Unif. poŝtkas 6, Tallinn.

Finna: O/Y. Movado A/B, Kasarminkatu 3, Helsinki.

Francja: Esp. Centra Libro, 81 rue de Clichy, Paris 9.

Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalun.

Hungara: Paŭlo Balkányi, Halas-utca 15-11-2, Budapest VI.

Itala: Itala Esperantista Federacio, Casella Postale 28, Verona.

Japana: Morizo Ōa, 16-V, Kitamachi, Aoiama, Tokio.

Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.

Latvia: Tallivado Indra, Rīga, Pašta kaste 47B.

Litova: Paŭlo v. Medem, Smeltis g-vė 13, Kaŭnas (Kovno).

Pola: Adolfo Oberroman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3126).

— Pola Esp. Servo (Fr. Prange), Kordeckiego 1 a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esp.-Centro Rumana, Bucuresti, Aleea Sufier, 19.

Rusa: Mikaelo Valentinov, sekretario de Centra Komitato de S. E. U., Moskvo, poŝtkas n-o 680.

Sveda: Förtägarbörningen Esperanto, u. p. a., Stokholm 1.

Svisa: Esp. Libro „Verda Selo“, Rosenheimstr. 5, St. Gallen-Ost.

U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, Box 22, Weehawken N.

**TAGLIBRO
 DE VILAĜPEDELO**

Interesa romansimila rakonto de la dana verkisto Blicher, tradukita de s-o Bult-hufers, L.K.-ano. Rekomendita de Esper-
 - - - antista Literatura Asocio. - - -

Ricevebla ĉe

Butin & Jung, Godesberg (Germ.)
 Esperanto-Eldonejo Bahnhofstr. 30
 Poŝtadreso tonto Köln 92006.

LA TRIUMFO DE ESPERANTO

Gramatika Praktiko
 Flandra kaj franca, de L. Varendonck

Prezo: 5.15 fk. enlande
 5.50 fk. eksterlande
 Rabato ĉe granda mendo.

Eldonejo:
 „La Tagiĝo“, Posthornstr. 14, Ledeburg (Belg.)

**Anoncado
 en ET donas profiton!**

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume 2 sinekvalaj enprezoj) kosta po 2 enprezoj kaj po 30 vortoj (krom u n u adreso) en la prezo de

6 ET-numeroj por la landoj Aŭstra, Bulgara, Estona, Germana, Hispana, Hungara, Jugoslava, Latvia, Litova, Polia, Rumana kaj Rusa;

5 ET-numeroj por la landoj Belgia, Ĉeĥoslovaka, Finna, Franca, Itala kaj Portugala;

4 ET-numeroj por ĉiuj aliaj landoj.

La pagon ni prenas de la abonkonto. Germanaj poŝtabonantoj pagu 3000 mk. Neabonantoj anstataŭ egalvaloron de 2 aviaj frankoj aŭ 8 stamp. respond-kuponojn. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

FIANĈIGO. S-o Henk Goemans fianĉiĝis kun f-ino Gladys Gertrude Shott 11. jan. en Konstantinopolo. La edziga ceremonio okazos 11. febr. en la preĝejo de la Nederlanda Ambasadejo en Pera, Konstantinopolo.

MORTO. Mortis en Sabadell s-o Enric Kostá, fervora Esperantisto.

SIBERIAJ, RUSAJ, AZIAJ GESAMIDEANOJ! Orientaj UEA-anoj! Kiu ajn el vi scias ion pri italiaj militkaptitoj, kiuj ankoraŭ estas en Rusujo kaj Siberio, kiu povas alsendi informojn pri ilia nombro, vivkondiĉoj, nomo, naskiĝloko ktp., tiu je la nomo de homa kaj Esperanta fratulado sciigu iliajn familiojn, helpu por serĉado de militistoj perdisigitaj dum la milito. Skribu al: arbigu@lon, kion vi scias! Adresu: R. Orengo, UEA-membro, Via Manzoni 5, La Spezia, Italujo. — Oni rekomencos laŭbe bonvolajn kaj seriozajn respondojn al ĉi tiu alvoko.

FILATELISTOJ! Por 1 dolaro, 5 svisaj aŭ 12 francaj frankoj aŭ egalvaloru mi tuj sendas belegan serion de rusaj poŝtmarkoj. Romanof (Michel N 80—96). Ankaŭ malofaj sovjetpoŝtmarkoj ĉe mi riceveblaj. Skribu tuj al H. Horodniĉius, Wilno, str. Anna 7, Polujo. — Antaŭpago!

ADRESARON DE FILATELISTOJ eldonos „Bohema Esperanto-Servo“ en Moravany (Boh.), Ĉeĥoslovakujo. — Sendu tuj vian adreson kun 0.50 Fav. aŭ 2 BES-kuponoj (malbonvalutuloj 0.25 Fav. aŭ 1 BES-kuponon) al supre citita eldonejo! — Postulu senpagan prospekton!

„LUMU“ OKSIGENON! Daŭre senkosta ĝuego, sanigas kaj ĝojigas. Miloj da rekomendoj. Facilkompreneblan germanlingvan klarigon kontraŭ 0.50 dol., 5 ŝil., 1.50 guld., 2 skand. kr., 3 svis. fk., 5 hisp. pes., 1.50 argent. pes. de Eldonejo Psychokratie, Hatfenheim a. Rh. 5 (Germ.). — Esperanto-iradukistoj serĉata.

BRODAĴOJ. Belaj svisaj brodaĵoj po kilogramo 50 sv. fk. sendas kontraŭ pago de ĉi tiu somo Charles Weyermann, Rorschach, Svisujo.

DIE MANNESLEHRE. (La virinstruo.) De Paulk. 2 volumoj germanlingvaj. Sportturnaj Bindte. Prezo 2 dol., 6 ŝil., 4 guld., 6 skand. kr., 10 svis. fk., 10 hisp. pes., 4 argent. pes. Miloj da rekomendoj. Eldonejo Psychokratie, Hatfenheim a. Rh. 5 (Germ.). — Esperanto-iradukistoj serĉata.

ABRESARON DE DIVERSAJ KOLEKTANTOJ eldonos „Bohema Esperanto-Servo“ en Moravany (Boh.), Ĉeĥoslovakujo. — Sendu tuj vian adreson kun 0.50 Fav. aŭ 2 BES-kuponoj (malbonvalutuloj 0.25 Fav. aŭ 1 BES-kuponon) al supre citita eldonejo! — Postulu senpagan prospekton!

GERMANA KOMERCA KOMIZO 25-jara, scianta la hollandan, anglan kaj rusan lingvojn, librotendadon, skribmaŝinon ktp. kun bona manskribo serĉas konvenan oficon. Oferto al Hermann Walther, Dresden-N, Alaonstr. 104 II 1.

KIO JAM NE ESTAS necesa por vi mem (malnovaj gazetoj kaj ĵurnaloj), bonvolu sendi al „Esperanta Studentaro“, Government Normal College Canton, Finujo. — Studentoj tre volonte legas pri nia movado, sed ili ne povas aboni ĉiujn gazetojn.

ALIĜU TUJ al nova (6-a) eldono de „BES-a Adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj!“ — Unu enskribo 0.50 Fav., por malbonvalutuloj 0.25 Fav., senpage por aĉetintoj de 4-a eldono! — Postulu prospekton de „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany (Boh.), Ĉeĥoslovakujo.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Y. Lindquist, Lahti, Hämeen 5, Finnlando, korespondas pri radiotelegrafilo kun spertuloj, precipe pri praktikaj detaloj kun memkonstruitoj de tiaj aparatoj. Ankaŭ pri abelkulturado kaj ties praktikado.

Filatelistoj kaj interŝanĝantoj! Postulu prospektojn de la plej bonaj kluboj: A. I. L. E., R. E. C. P., L. E., Grzegorz Korczemny, Łuck, Jagiellońska 46, Polujo.

Mi proponas al transmara kolektantoj amatoraj hungaraj, bohemiaj, aŭstraj kaj germanaj poŝtmarkojn por ŝanĝi kaj aĉeti: V. Vladimir Vajda, Hamburg 4, Lincolnstr. 2/III. Mi deziras korespondi per ilustritaj poŝtmarkoj kun ĉiuj landoj. Martin Krauskopf, Wien XXI, Wagramerstr. 112, Aŭstrujo.

Dr. Vogt'sche Bank, Stuttgart, Germ.

Wallruthbau Komandit-Societo Friedrichstr. 13

Telefono: N-oj 11458 kaj 11459. — Telegr.-Adreso: Bankvogt

Aĉeto kaj vendo de valorpapiroj.
 Procentado de kontantaj deponoj.
 Aĉeto kaj vendo de fremdaj valutoj.
 Perado de ĉiuspecaj negocoj.

Kongresanoj por la XV-a.

888. Martin Otto, Chemnitz.
 889. Martin, s-ino, Chemnitz.
 890. Kirchner Emil, Chemnitz.
 891. D-ro Ebner Adolf, Königsberg.
 892. Fritsche Ernst, Oschatz.
 893. Tanimann Reinhard, Oschatz.
 894. Adamy Heinrich, Coblenz.
 895. Flemming Hans, Coblenz.
 896. Weber Katharina, f-ino, Coblenz.
 897. Wenz Friedrich, Coblenz.
 898. Hund Adam, Mainz.
 899. Rheinrich, Mainz.
 900. Knoop Ferdinand, Mainz.
 901. Becker Peter, Mainz.
 902. Becker, s-ino, Mainz.
 903. Hiltinger Thea, f-ino, Traunstein.
 904. Badum Clemens, Traunstein.
 905. Kain Johann, Traunstein.
 906. Dotachilli Franziska, f-ino, Traunstein.
 907. Dotachilli Anton, Traunstein.
 908. Bertecher Albert, Traunstein.
 909. Zaiser Johann, Traunstein.
 910. Spiegelberger Georg, Traunstein.
 911. Mittersteiner Eduard, Bergen (Obb).
 912. D-ro Göhl Hermann, Muggersdorf (Sachsen).
 913. Johannes Georg, Düsseldorf.
 914. D-ro Bernhard Alfred, München.
 915. Roth Else, f-ino, München.
 916. Sperl Franz, München.
 917. Erhard Hans, München.
 918. Heilmeier Ludwig, München.
 919. Neudorfer Fanny, f-ino, München.
 920. Lohrer Emil, München.
 921. Tressel Hans, München.
 922. Ziegler Friedrich, München.
 923. Diehl Hans, München.
 924. Koch Kuny, s-ino, München.
 925. Blankenheim Max, Berlin-Steglitz.
 926. Blankenheim Hilda, Berlin-Steglitz.
 927. D-ro Houcha August, Wien.
 928. Prestele Martin, Lorch (Württemberg).
 929. Averin Bazilo, Astrachan.
 930. Taddiken Walter, Wilhelmshafen.
 931. Hess Kurt, Rüstingen.
 932. Beuschel Wilhelm, Ansbach.
 933. Küttner Paul, Mannheim.
 934. Elisen Helene, f-ino, Mannheim.
 935. Bernhard Heinrich, Friedrichsthal.
 936. D-ro Bünner Wilhelm, Offenbach a. M.
 937. Büttner, s-ino, Offenbach a. M.
 938. Reiter Wilhelm, Sulzbach.
 939. Schärer Fritz, Altenwald.
 940. Schukowski Otto, Frankfurt a. M.
 941. Major Josef, Altenburg (Sachsen).
 942. Rosenberg Nikolaus, Altenburg (Sachsen).
 943. D-ro Albert Bruno, Mannheim.
 944. Stämmel August, Mannheim.
 945. Eder Emil, Mannheim.
 946. Marbach Robert, Mannheim.
 947. Klein Rudolf, Mannheim.
 948. Klein Valentin, Mannheim.
 949. Birkle Anton, Mannheim.
 950. Ochs Lothar, Mannheim.
 951. Becker Franz, Mannheim.
 952. Veden Theo, Mannheim.
 953. Franz Johann, Mannheim.
 954. Chomette Charles, New York.
 955. Silbernik Josef, New York.
 956. Menschick Johann, Regensburg.
 957. Stredt Georg, Leipzig.
 958. Stredt Gertrud, s-ino, Leipzig.
 959. Doss Rudl Auerbach I. V.
 960. Doss Emmi, s-ino, Auerbach I. V.

961. Zschiedrich Martin, Nossen
 962. Skayutin Sergej, Ĉita (Siberio)
 963. Markau Emil, Potsdam
 964. Markau Hedwig, s-ino, Potsdam
 965. Sykora Max, Dresden
 966. Ahlbach Wilhelm, Horst Emscher (Westf.)
 967. Hering Richard, Grehen bei Grimma
 968. Gerke Heinrich, Bremen
 969. Jürgens Mariechen, f-ino, Bremen
 970. Jakob Josef, München
 971. Sachs Mariha, f-ino, Plauen I. V.
 972. Sachs Elly, f-ino, Plauen I. V.
 973. Röder Paul, Plauen I. V.
 974. Röder Elise, s-ino, Plauen I. V.
 975. Rödel Willy, Plauen I. V.
 976. Schmidt Helene, f-ino, Plauen I. V.
 977. Ludwig Gertrud, f-ino, Plauen I. V.
 978. Kühn Friedrich, Plauen I. V.
 979. Kühn Marie, s-ino, Plauen I. V.
 980. Heinrich Hans, Plauen I. V.
 981. Hegewald Rudolf, Weissenborn (Sa.)
 982. Glöckner Paul, Freiberg i. S.
 983. Kappelmann Hans, Dresden
 984. Klein Alfred, Freiberg i. S.
 985. Hegewald Rudolf, Freiberg i. S.
 986. Spitzner Karl, Freiberg i. S.
 987. Teucher Alfred, Freiberg i. S.
 988. Müller Reinhard, Freiberg i. S.
 989. Hellwig Martin, Freiberg i. S.
 990. Wittbrodt Wilhelm, Berlin Neukölln
 991. Naumann Albrecht, Werden (Sachsen)
 992. Naumann Meta, s-ino, Werden (Sachsen)
 993. Wendler Hermann, Leipzig
 994. Bareiss Heinrich, Stuttgart
 995. Bareiss Klara, s-ino, Stuttgart
 996. Schmidt Geo, Kleinglienicke
 997. Schmidt Traute, s-ino, Kleinglienicke
 998. Baumann Willi, Kleinglienicke
 999. Knoop, s-ino, Mainz
 1000. Hammer Herbert, Zürich
 1001. Pihhofer Otto, Nürnberg
 1002. Muscar Emil, Nürnberg
 1003. Gutmann Ida, f-ino, Nürnberg
 1004. Hoffmann Christian, Nürnberg
 1005. Kasner Anna, f-ino, Nürnberg
 1006. Koch Peter, Nürnberg
 1007. Flierl Johann, Nürnberg
 1008. Volkert Georg, Nürnberg
 1009. Gross, Röhrenbach a Pegnitz
 1010. D-ro Steckelmacher Eugenie, s-ino, Nürnberg
 1011. Pollinger Sebastian, Nürnberg
 1012. Lebitsamer Gustav, Nürnberg
 1013. Götz Max, Nürnberg
 1014. Hönigsberger Max, Nürnberg
 1015. Schlicht Oskar, Roth a. S.
 1016. Wendl Hans, Nürnberg
 1017. D-ro Orthal Heinrich, Nürnberg
 1018. Orthal Antonie, s-ino, Nürnberg
 1019. D-ro Ledermann, Richard, Nürnberg
 1020. Meyer Lorenz, Nürnberg
 1021. Christlein Andreas, Nürnberg
 1022. Leu Emil, Fürth i. B.
 1023. Leu Mina, s-ino, Fürth
 1024. Hirsch Anni, f-ino, Burgfarnbach
 1025. Meyer-Kristin Alfred, Nürnberg
 1026. Haas Heinrich, Nürnberg
 1027. Mezger Ida, Nürnberg
 1028. Lebitsamer Alfred, Nürnberg
 1029. Walter Alfred, Nürnberg
 1030. Wolfm Christian, Nürnberg
 1031. Weisbart Josef, Nürnberg
 1032. D-ro Eberle Wilhelm, Nürnberg
 1033. Rosenthal Albert, Nürnberg
 1034. Degen Grete, f-ino, Nürnberg
 1035. Reiner Wilhelm, Nürnberg
 1036. Hellmuth Christoph, Nürnberg
 1037. Lotter Wilhelm, Nürnberg
 1038. Balzer Jobst, Nürnberg
 1039. D-ro Loesch Georg, Nürnberg
 1040. Ulmer Hans, Nürnberg
 1041. Hahn Hans, Nürnberg
 1042. Schlicht Gustav, Nürnberg
 1043. Baer Siegfried, Roth b. Nbg.
 1044. Pfeiffer August, Roth b. Nbg.
 1045. Teschner Georg, Nürnberg
 1046. Zirkler Robert, Nürnberg
 1047. Wagner Fritz, Nürnberg
 1048. Döhlemann Alex., Nürnberg
 1049. Thamerus Albert, Nürnberg
 1050. Scheffauer Hans, Nürnberg
 1051. Kleider Anneliese, f-ino, Nürnberg
 1052. Kleider Lotte, f-ino, Nürnberg
 1053. D-ro Kleider Otto, Nürnberg
 1054. Naas Heinrich, Nürnberg
 1055. Stahl Johannes, Nürnberg
 1056. Thoma Käthe, s-ino, Nürnberg
 1057. Muskat Theodor, Nürnberg
 1058. Loos Fritz, Nürnberg

(Daŭrigota.)

Kiune Jam aliĝis, aliĝu tuj!

S-oj Joz. Retsin kaj René Biommaert, Staatsnormaalschool Ledeganckstr. 8, Gent, Belgujo, deziras korespondi per ilustr. poŝtmarkoj kun samideanoj de la tuta mondo kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.

Du fraŭlinoj: Florida Noppe, rue du Moulin 137, kaj Albertina De Schriver, rue du Moulin, 135, ambaŭ en Lokeren, Belgujo, deziras korespondi poŝtmarkoj kaj letere.

S-oj Victor De Merlier kaj Maurice Baeyens, Staatsnormaalschool, Ledeganckstr. 8, Gent, Belgujo, 18-jara, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtmarkoj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Edgardo Van Gysegheem, studento, rue Ledeganck 8 Gand, Belgujo, deziras korespondi per ilustr. poŝtmarkoj (bfl.), poŝtmarkoj kaj leteroj kun la tuta mondo, presipe kun junaj fraŭlinoj.

F-ino Gerda Spiess, Danzig, Goldschmiedegasse 25 (Freistaat Danzig), 17-jara, deziras interŝanĝi vidajkartojn, leterojn, poŝtmarkojn kaj gazetojn kun ĉiuj landoj.

Gesamideanoj! Kiu interŝanĝas kun mi poŝtmarkojn uzitajn? Mi sendas nombron kontraŭ nombro. S-o Max Wiedemuth, Niederoderwitz 21, bei Zittau i. S., Germanujo.

S-o Rudolph Selge, Tallinn, Estonujo, Suur Aareha 40, krt. 5, veturinta post la XIV-a ira Finnlando, Germanujo, Svisujo, Italujo, Tirolujo, Aŭstrujo, deziras interŝanĝi foto-grafojn kaj artajn vidajkartojn el ĉiuj urboj de la menciitaj landoj.

F-ino Salomea Lewandowska, gimnazianino, Inowroclaw, Sw. Duchy 88, Polujo.
 F-ino Irena Wasilewska, gimnazianino, Inowroclaw, Toruńska 2, Polujo, deziras korespondi per poŝtmarkoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

S-o Josef Polz, Trautenau, Erbenfelderstr. 15, Bohemlando, interŝanĝas ilustr. poŝtmarkojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Stefano Ivanoviĉ Akimov, 145. Radioestacio O. K. A., Tiflis, Georgio, Kaŭkazo, interŝanĝas ilustr. poŝtmarkojn (bfl.), leterojn, gazetojn, Esperantojn.

Fraŭlo Mantegazza Mario, Via Canonica 81, Milano 27, Italujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtmarkoj kaj poŝtmarkojn.

S-o Alf. Sover, Nömmen, Estonio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn ilustr. de ĉirkauzo, naciajn ĵurnalojn, moneretojn ktp.